



TEA-BULTENO

25^A JARO - N° 163

MAJO-JUNIO-JULIO

N. 5-6-7/2022

Zorge ni sekvu la instruojn de la historio: forgesinte la doloron de milito, tro multaj forgesas la bezonon pri paco, kiu nestas en ĉiu proksimulo, en ĉiu frato. Kaj tiel oni lasas sin venki de la mondo.

Titus Brandsma, sacerdoto, ĵurnalisto, verkisto, profesoro, esperantisto (1881-1942)

Kara Legantaro!

Ĉi-foje mi devas komenci la kutiman enkondukon per pardonpeto: ja junio estas finiĝonta kaj eble vi legos ĉi vortojn nur en julio! Teruran malfruiĝon havas ĉi periodaĵo. Mi ne ĝenos vin per miaj dubindaj pretekstoj, sed mi esperas, ke pro la bonega kaj interesege enhavo (ndr: *iom malmodeste dirite*) vi emos forgesi mian pekon.

Granda evento okazis en la katolika Esperanto-mondo:

t.e. la sanktuliĝo de la beata Titus Brandsma, ĉiela patrono de IKUE, kiu, per ceremonio en Placo S-ta Petro, Romo, estis solene kanonizita de papo Francisko je la 5^a Paska dimanĉo, nome la 15^{an} de majo 2022.

Ne gravas, ĉu oni estas religiema aŭ ateisma, katolika aŭ protestanta, ĉar tio dirita simbolas la rekonon de la elstara agado de vere eksterordinara persono: karmelana kaj ekumenisma sacerdoto, universitata profesoro, verk-

isto, ĵurnalisto kaj ... Esperantisto!

Li dediĉis sian tutan vivon al aliaj, pasie kaj kuraĝe li obstinis al la vero, al defendo de iu ajn kredo kaj de la esprimlibereco. Kiel ĵurnalisto li asertis: "la presaĵoj estas la plej taŭga podio de kie prediki la veron... Ni uzu ilin, ĉar tiuj estas la forto de la paroloj kontraŭ la perforto de la armiloj, ili estas la forto de nia luktado por atingi de la vero."

Via redaktanto Elda

La 15^{an} de majo 2022

Papo Francisko proklamis Sankta la esperantiston *Titus Brandsma*

- Prenu ĉi tiun rozarion, bonvole ĝin uzu por preĝi.

- Mi ne bezonas ĝin. Mi ne kapablas preĝi.

- Provu almenaŭ diri: *Saluton Maria, preĝu por ni, pekuloj...*

Dimanĉon la 26^{an} de julio 1942, en la koncentrejo de Dachau: Juna nederlanda flegistino, serve de la naziaj torturistoj, estas murdonta per injektado de karbola acido (aŭ *fenolo*) la samnacionon Titus Brandsma. Tiuj supre diritaj vortoj tute ne efikas sur ŝin, tiumomente, kaj ŝi finfaras sian *devon* laŭordone. Kelkajn tagojn antaŭ sia morto li estis transdoninta ĝuste tiun rozarion al kuracisto, dirante: "Baldaŭ mi ne plu bezonos ĝin".

Sed tiu fakto restas gravurita en la memoro kaj koro de tiu flegistino. Postmilito ŝi vivas sub malvera nomo, persekutata de la polico el duona Eŭropo pro siaj brutalaj kaj mortigoj de miloj da malliberuloj. En 1955 ŝi prezentas sin spontanee, sed sekrete, kiel atestanto dum la proceso de beatigado de T. Brandsma: je la 3^a de novembro 1985 Johano Paŭlo la 2^a lin proklamas "Beata" kaj "Martiro". La Papo tiel ĉi lin difinas: "la martiro de sinesprimlibe-

reco", pro lia firma luktado, kiel ĵurnalisto, kontraŭ la tiraneco de la diktaturo kaj streĉa defendado de la katolika gazetaro, pro multima verkado de artikoloj prezentantaj la puran, senvualan veron, pro lia kuraĝo oponi solidan rezistofronton al naziismo.

La 25^{an} de novembro 2021 Papo Francisko rajtigas la Kongregacion de sanktuloj promulgi dekretan rilate al miraklo atribuita al Titus Brandsma. Ĝi ligiĝas al pastro Michel Driscoll, usonano, kiu, en 2004, suferis pro maligna melanomo 4-stadia: li propetis pastron Titus je resaniĝo kaj lia alvoko estis elaŭdita.

Vivo

La 23^{an} de februaro 1881, en la granda bieno de Ugokioster, en Frisio, Nederlando, naskiĝas, kvina el ses gefiloj, Anno Sjoerd Brandsma en familio de katolikaj kamparanoj. El lia frataro kvin iĝas monaĥoj. Inteligenta, facile lernanta, studema kaj religiema, dekonujara li eniras franciskan studentpensionon. Dekok-aĝa li daŭrigas sian studadon ĉe karmelana monaĥejo: pro amo kaj respekto al la patro li alprenas lian personan nomon, Titus. Inter preĝado kaj lernado, li eksentas grandan em-